



ĈIPAĜE | COTONOU, BENINO





# Momenton!

#09 AŬTUNO2006

Brazilaesperantistajunularaorganizo BEJO




CIPAGE | UNU EL LA GRAVULOJ DE LA VUDUO-FESTIVALO EN BENINO





# Momenton!

#9 AŬTUNO 2006



Antaŭ ol vi mem diros, mi jam agnoskas - Nia revuo fariĝis preskaŭ turisma!

Sed mi ne diras tion kun honto, tute male - mi ĝojas. Ni ĝojas, ĉar nur ni havas tiom vojaĝeman kunlaboranton kiel Roĝer Borĝes por liveri al ni tiom da nekutimaj impresoj el distaj lokoj (kaj ĉi-momente, kiam mi skribas, li estas en Japanio).

Benino estis la afrika lando, kiun vizitis li kaj Olga Cervero. El la lando de vuduo (foje nomata kiel nigra magio) ili rakontas al ni, kion tie ili spertis.

La tempo flugas! Apenaŭ venis novjaro kaj ni jam troviĝas meze de la kalendaro! En ĉi tiu periodo, ĉiun kvaran jaron okazas la futblala mondpokalo. Ke futbalo estas brazila pasio, ni jam scias, sed ĉu ankaŭ al esperantistoj tiom plaĉas futbalo? Al Roger Gotardi el Kuritibo-PR certe jes! Li prezentas al ni resumon, de ĉiuj mondpokaloj jam okazintaj! La unua parto en ĉi tiu eldono iras ĝis la mondpokalo de 1970, tiel Momenton prezentos la historion de la mondturniroj ĝis la tria ĉampiontitolo de Brazilo :)

Ĉu nur mondpokalo okazos ĉi-jarmeze? Ho! Ne! Kiel forgesi la esperantajn aranĝojn? Legu vi, en venontaj paĝo,j kion oni programas por la BEJK en Campinas-SP

Se la ekscito por veni al BEJK tiom grandas, ni rekomendas vin iom ripozi per la praktikado de Taj Ŝi Ŝuan, mikso de luktoarto kaj terapio. Legu intervjuon kun la ĉina majstro de Felipe Queiroz el Santos-SP, kiu sendis la artikolon.

Se vi deziras aktiviĝi en BEJO, dum la kongreso okazos elekto de nova estraro. Pliajn informojn vi trovos ĉi tie. Informojn kaj tradukon de poemo de la ĉilia poeto Pablo Neruda. Fine, ne fidu je viaj okuloj kaj ludu iomete per la trompbildoj, senditaj de Aneta Ubick el Germanio.

Ĝuu la revuon kaj ĝis la BEJK!

Rogener Pavinski
Ĉefredaktoro
Aprilo/2006

MOMENTON > Kvarmonata revuo de BEJO.
**REDAKTADO** kaj **ARTO** | Rogener Pavinski, Ribeirão Preto.
**ARTO** kaj **PRILABORADO** | Roger Borges, Madrid.
**SUPERRIGARDO** | Ísis Okabe Piton, Campinas.
**REVIZIADO** | James R. Piton, Campinas.
**DISTRIBUADO** | BEJO, fondita en 1967 (Landa Sekcio de TEJO ekde 1968).
Caixa Postal 1097 13012-971 Campinas, SP

**momenton@gmail.com.br** **www.esperanto.org.br/bejo**



# Torne-se ativo na BEJO em

Tiu ĉi estas jaro por ŝanĝoj en BEJO, eĉ se multaj ŝanĝoj jam okazis ekde la lastaj jaroj: la nombro de BEJO-membroj kreskis, la bonhavo de BEJO montras finance sekuran situacion. "Momenton!" el bulteno iĝis revuo; BEJO nun estas sekcio de BEL, kaj oni denove rajtas ricevi Brazilan Esperantiston (BE) kaj unuafoje partoprenos en Jarlibro de BEL. Oni havas hejmpaĝon, diskutliston, sekve aktivan partoprenon en la reto... Oni havas aktivaĵojn por junuloj dum kongresoj, faritajn de junuloj kaj plenkreskuloj, kun apogo de la Prezidanto de BEL. Oni havas eksterlandajn junulojn reprezentantajn BEJO-n en siaj kunveoj kiel ambasadoroj de BEJO. Oni faras du konkursojn, BEJO-Ataŝeo (kun subteno de BEL), kaj ankaŭ pri la starigita Reto de Reprezentantoj de BEJO (RR). Tamen ankoraŭ estas multo por fari kaj BEJO bezonas nun novajn fortojn por daŭrigi kaj plibonigi siajn servojn - kaj starigi aliajn.

Dum 26° BEJK okazos balotado por elekti la novan estraron de BEJO. Ĉiuj estas invitataj ĝui nian kongreson, kiu jam estas plena je aktivaĵoj kaj ankaŭ por formi sian skipon kaj konkuri en la balotado. Aŭ simple sin prezenti por iu tasko ĉe BEJO. Mi ne rekandidatiĝas por tiu tasko, tamen mi daŭre subtenos BEJO-n, kvankam ne oficiale. Mia nova kampo en Esperantio estas la esperantaj familioj kaj vi trovos en BE artikolojn rilate al tiu temo. Tie ĉi mi profitas por inviti vin koni la laboron kaj la infanojn de Infana Kongreseto en Campinas. Dekomence ni havas konfirmon de 12 E-desnaskuloj partoprenontaj tiun ĉi kongreson. Ili aĝas inter 11 monatoj ĝis 10 jaroj. Se vi ŝatas infanojn kaj volas helpi, vi estas bonvenaj!

En la venonta numero de "Momenton!", la lasta de tiu ĉi skipo, ni raportos pri la Kongreso kaj prezentiĝos al vi la nova estraro de BEJO. Ĝis tiam!

**Ísis Climany Okabe Piton**
**BEJO-Prezidantino**



# 2006!

Este ano, durante o congresso esperantista da juventude brasileira, a ser realizado em Campinas de 5 a 19 de Julho, ocorrerá a mudança da diretoria da BEJO, a juventude esperantista brasileira. De acordo com o seu estatuto, a cada dois anos os membros da BEJO devem eleger uma nova diretoria e um novo conselho fiscal durante a assembléia ordinária da BEJO dentro do congresso brasileiro de esperanto.
A nova diretoria administrará a BEJO em uma nova fase, quando esta organização passará a ser oficialmente seção jovem de uma organização maior, a Liga Brasileira de Esperanto. Será então oficializado um novo estatuto aprovado pela BEJO, que já há um bom tempo tentava essa fusão entre as duas organizações, que segue o modelo proposto pela UEA e a TEJO.

Candidatos aos cargos de diretoria e conselho fiscal devem ser membros da BEJO e ter menos de 30 anos. Os candidatos devem, preferencialmente com antecedência, formar chapas que preencham os cargos da diretoria: Presidente, Secretário e Tesoureiro. Além destes cargos compete à diretoria procurar e preencher as vagas para os importantes cargos de: Coordenador de eventos, Coordenador de Internet e Coordenador de Redação.

Além da assembléia geral e outras atividades comuns nos congressos de esperanto, a atual diretoria tem planos de organizar um seminário de treinamento de ativistas durante o congresso para que que os esperantistas que venham a assumir cargos no movimento jovem possam ter alguma base de experiência que os ajudará no cumprimento das tarefas. Informações e dúvidas sobre a BEJO, a eleição ou a formação de chapas? Escreva:

**bejoesperanto@yahoo.com.br**

Antaŭ kelkaj jarcentoj, la regno de Dahomey estis unu el la plej potencaj imperioj en okcidenta Afriko, kies landlimoj estis multfoje pli vastaj ol la hodiaŭaj bordoj, streĉitaj inter Togolando kaj Niĝerio. Hodiaŭ, post ĵusa marksista periodo (Benino estis komunisma dum 17 jaroj), la lando vigle renaskiĝas, brakumante demokration senhaste. La baldaŭaj balotadoj denove donas fajreron de espero al la popolo, kaj la estonto ŝajnas brila.

La esperantistoj Roĝer Borĝes (Brazilo) kaj Olga Cervera (Hispanio) vizitis tiun regionon je la komenco de 2006 pere de Pasporta Servo, la gastiga reto de TEJO. Kun la senlaca helpemo de François Hounsounou, reprezentanto de la junulara esperanto-movado en Afriko, ili travojaĝis la tutan landon, de la suda marbordo ĝis la landlimo kun Burkina Faso. Estis mirinda, neforgesebla aventuro!

Benino, la naskiĝloko de la vuduo, ankoraŭ havas multegon el la interesaĵoj, kiuj kaptis la atenton de la unuaj alvenintaj Eŭropanoj. En la suda parto, fiŝkaptistaj vilaĝoj konstruitaj sur mastoj troviĝas inter la plej popularaj bildoj de Afriko kaj nepre indas vizitado. Norde, naturo abundas en larĝaj protektitaj naturrezervejoj. Tie vivas la popolo “Somba”, kies kutimoj restas sensânĝaj samkiel dum la lastaj 500 jaroj.

Ekzistas fakte pli ol 30 triboj, kun siaj respektivaj malsimilaj lingvoj. Danke al tio, ke ni vojaĝis kun landanoj, eblis viziti ankaŭ forajn ruralajn vilaĝojn kaj konatiĝi kun diversaj etnaj grupoj, ĉefe la “Fon”. Tio estus tro malfacila sen Esperanto - kaj nur konfirmas la utilecon de neŭtrala lingvo kaj ĝian kapablon laŭlitere “malfermi pordojn”.

# BENIN’

## la lando de l’ vudu’

La vojaĝo komenciĝis en Cotonou, la ĉefa urbo por ĉio ajn, escepte ke ĝi ne estas la oficiala ĉefurbo (“Porto Novo” estas tia). Kun pli ol unu miliono da loĝantoj, Cotonou estas ja freneza urbego, kun grava atmosfera poluado, sed certe ankaŭ kun siaj ĉarmoj. La plej granda bazaro de la tuta lando troviĝas tie, kaj nomiĝas “Grand Marché du Dantokpa”. En ĝi troveblas io ajn, de surstrata manĝaĵo, vestaĵoj, radio-aparatoj, ĝis vespertaj flugiloj aŭ simiaj testikoj. Ni aŭdis pri iu kurioza afero nomata “le fetiche de l'amour” (la fetiĉo de la amo). Prenu ĝin, flustru la nomon de la amata persono sepfoje, tuŝu la deziratan homon kaj li/ŝi estos via!

Sed eble la plej interesa loko estas la apuda vilaĝeto, Ganvié, kie 30 000 homoj loĝas en bambuaj domoj sur la akvoj de lago. Ni prenis boateton kaj la gvidanto eksplikis, ke en la 18ª jarcento la “Tofinu”-popolo venis tie ĉi por eviti la bataladon inter la Fon-reĝoj. La lago estis la plej sekura loko pro antikva tradicio, kiu malpermesis al la batalistoj eniri akven. Hodiaŭ, ĉiuj domoj staras 2 metrojn super la akvo - eĉ la telefonejo, poŝt-oficejo kaj baza lernejo. Homoj vivtenas sin preskaŭ ekskluzive per fiŝkaptado; la plejmulto de la virinoj respondecas pri boata transportado kaj komerco. Ili fakte aldonas multe da koloro al la pejzaĝo per siaj fruktoj, spicoj kaj vestaĵoj.

Ni pluvojaĝis buse 1 000 km norden, ĝis la naturrezervejo “Parc National de la Pendjari”. Ĝi estas unu el la plej bonaj lokoj en Okcidenta Afriko por vidi bestojn kaj ni estis tre bonŝancaj. Ni vidis antilopojn, pavianojn, leonojn, hipopotamojn, elefantojn… Eĉ krokodilojn ni vidis ;-)





Ni ankaŭ konatiĝis kun la popolo “Betamaribé” (kutime nomata “Somba”). Ili koncentriĝas proksime de la urbeto Naititingou sed vivas meze de siaj agrikulturaj kampoj, apartigitaj unuj de la aliaj, anstataŭ kune en vilaĝetoj. Tiu tradicio montras ilian individuecon kaj helpis la prezervadon de ilia kulturo kontraŭ Islamaj kaj Kristanaj influoj. La plej granda parto de la Betamaribé-komunumo estas fervoraj animistoj. Iam ili estis ĉiam nudaj, sed nuntempe ili uzas vestaĵojn. Ĉiukaze, ili daŭre ĉasas pere de pafarkoj. Ĉefe interesa estas ilia tipa konstruaĵo, nomata “Tata Somba”. Ĝi konsistas el malgrandaj, rondaj kabanoj kiuj aspektas kiel etaj kasteloj. La suba etaĝo estas rezervita por animaloj; interetaĝe situas la kuirejo. Supre estas teraco, kie troviĝas dormĉambroj kaj graneroj. Ni ankaŭ vizitis la “Kota”-akvofalojn por freŝa banado, meze de la naturo, antaŭ ol reveni al la sudo de Benino.

Bedaŭrinde, François akiris malarion (febra malsano propra al marĉaj regionoj, transinokulita per piko de kuloj) kaj devis reveni al sia hejmo por preni medikamenton. Mi kaj Olga haltis do en la urbo Ouidah por la Jara Festivalo de Vuduistoj (celebrita ĉiujare je la 10ª de Januaro). Vuduo, la tradicia religio de Benino, sekvas la ĝeneralan formon trovitan en Afriko, kie estas unu supera dio kun multaj aliaj malpli potencaj dioj aŭ spiritoj, kiuj siaflanke apartenas kaj al la etna grupo, kaj al la spirita mondo de la ancestroj de la adepto. Kutime, oni konsultas la pastrojn (“juju”-homoj) pro ilia kapablo komunikiĝi kun la spiritoj kaj trovi helpon. Tiu komunikado estas efektivigita per ritualo kiu kutime koncernas la sakrifikadon aŭ donadon de palma vino, ĝino aŭ manĝaĵoj, kiel ovoj, kokinoj aŭ kaproj. La graco de la spiritoj estas esenca al protekto kaj prospero, kaj kelkaj spiritoj povas esti alvokitaj por malbonaj, malicaj celoj.







Dum 300 jaroj la reĝoj de Dahomey vendis kaptitajn malamikojn kiel sklavojn al eŭropanoj. Tiuj sklavoj estis senditaj ĉefe al la tiamaj kolonioj en Brazilo, Kubo kaj Haitio. Al la “nova mondo” la sklavoj ankaŭ portis sian religion, kiu disvolviĝis kaj estas aktive praktikata ĝis hodiaŭ. Originale, la vorto “vodun” signifis 'kaŝita' aŭ 'mistero'. La kredo evoluis kaj enkorpigis trajtojn de la Romia Katolikismo, precipe pro la fakto, ke la sklavoj ne rajtis veneri siajn proprajn diojn. La afrikamerika versio de vuduo estis distordita de la kino-industrio kaj propagandita kiel “Nigra Magio”.

En Ouidah ni piediris 4 km portante niajn dorsosakojn tra la “Route des Esclaves”, la sama vojo kie marŝis la sklavoj. Je la fino, ĉe la marbordo, troviĝas la 'Pordo sen Reveno', memora monumento al tiu malhela pasinteco. Se oni fermas la okulojn, aŭdeblas la sonon de la ondoj, la bruon de la katenoj kaj eĉ la kriojn de malespero... Ĉi tie ni ĝuis la vudu-festivalon, dancante inter la homoj kaj la drumoj ĝis la nokto, nokto-fin'.

Post kelkaj tagoj, finfine ni atingis “Lokossa”, la hejmo de Esperanto en Afriko. La movado forte kreskas kaj eĉ la Afrika Oficejo de UEA estis entute translokigita tien. La ĉefa kialo por lerni la internacian lingvon estas korespondado. Kompreneble, la vizito de eksterlandanoj aldonas novan instigon al la studado de Esperanto. Roĝer prelegis en lernejo pri la rilatoj inter Benino kaj Brazilo fakte pli ol unu miliono da gebeninanoj estis senditaj kiel sklavoj al la tiama Portugala kolonio. Je la fino de la prelego oni parolis pri futbalo (neeviteble...) kaj estis donacita pilko kiel simbolo de amikeco inter BEF kaj BEJO.

MALDEKSTRE | EN BENINA ESPERANTO-CENTRO
DEKSTRE | LA POPOLO DUM VUDUO-FESTIVALO

Finfine, ni iris al Abomey, la malnova centro de la Granda Regno de Dahomey. La ĉefa vidindaĵo estas la riparata reĝa palaco kaj la elstara muzeo kiu temas pri la historio de la imperio. Antaŭ la alveno de la Francoj, ĉi tiu palaco estis la plej granda en la tuta Okcidenta Afriko; fakte, temis pri diversaj konstruaĵoj, ĉar ĉiu sinsekva reĝo konstruigis sian propran palacon, ekde 1645. La rezulto estas spektakla: je la 19ª jarcento, ene de ĝi loĝis 10 mil personoj, krom haremo kun la 800 (!) edzinoj de la reganto. Bedaŭrinde, kiam la lasta reĝo, Béhanzin, antaŭvidis la (eminentan) malvenkon, li ekbruligis ĉion… Feliĉe, du palacoj daŭre restas prezervitaj kaj la ejo estas deklarita kiel Monda Heredaĵo de UNESCO. Multaj objektoj estas konservataj en la muzeo, inkluzive de la trono de Ghézo, muntita sur la (realaj!) kraneoj de kvar konkeritaj malamikoj.

Verdire, tiu ne estis facila vojaĝo. Kun endemia ekonomia krizo, minimumaj sanitar-kondiĉoj kaj gravaj politikaj problemoj en (pli grandaj) najbaraj landoj, Benino multe klopodas por plibonigi sian situacion. Senarbigo pro la industrio de kotono, la ĉefa eksportaĵo, daŭre kaŭzas multege da problemoj, kun preskaŭ kompleta detruo de la sudaj ĝangaloj. Ĉe la nordo, sekeco endanĝerigas la vivon de sovaĝaj bestoj kaj kaŭzas multe da doloro al la indiĝenaj popoloj. Ĉar manĝaĵoj ne estas sufiĉe diversaj, nutrado estas deficita kaj la infanoj suferas plej. Estas facile perdi la esperon, sed ne ĉio estas perdita. La unua paŝo estas informiĝi. Pere de legado de ĵurnaloj, revuoj aŭ libroj oni povas ekscii pri la ĝenerala panoramo; des pli bone, vojaĝi permesas pli detale konatiĝi kun la mikro-ekonomia situacio kaj ankaŭ la frenezan koruptadon, je kosto de la civitanoj. Ŝarĝita de tiuj scioj, oni povas ekzameni la agadon de niaj propraj registaroj kaj plendi al politikistoj el pli informita vidpunkto. La sekva paŝo estas ekmoviĝi al iu formo de reala kontribuo al la plibonigo de la Afrika kondiĉo, kiel individuo aŭ Ne-Registara Organizo. Eĉ se la statistikoj pri la nigra kontinento donas la impreson, ke la problemo estas nesolvebla, la realo estas, ke alia mondo vere eblas. La mirinda laboro de la esperanto-instruistoj Housounou kaj Latifou simple montras al ni ke, paŝon post paŝo, iom post iom, ja eblas plibonigi la grandan bildon. Espereble kiam ĉiuj ni prenos la respondecon, tiu malfacila tasko estos finfine plenumita.

RAPORTIS | ROĜER BORĜES
FOTIS | OLGA CERVERA



# Ne ploru plu!



# Ĉar jam venas BEJK 2006!

*De la 15-a ĝis la 19-a de Julio 2006*

Ne, ne ploru plu! Venos la plej atendita Brazila Kongreso de multaj jaroj. Aŭ multe ploru - kompreneble, se vi ĝin maltrafos.

Ĝi multe promesas. Oni festos la 100-jaran datrevenon de la fondiĝo de la unua E-klubo en Brazilo - Suda Stelaro, en Campinas-SP, nia ĉi-jara kongresejo!

La Junulara Kongreso, kiu kunokazos samtempe, havos proprajn tre interesajn programerojn, kaj vi estas ivitata kontribui al ĝi!

Tute nemaltrafinda okazaĵo estas la spektaklo de JOMO. Jes ja! JoMo estos inter ni la unuan fojon en Brazilo! Rekte el Francio por nia 26a BEJK!

Vizitu la blogon http://bejk2006.blogspot.com/ por legi pri la freŝaj novaĵoj. Kontribuo-proponojn sendu al la kunordiganto Jimes Milanez <jimesvm@gmail.com>

Ni vidu nin tie!






JOMO - "ĈU VI VOLAS DANCI?"




**ĈIPAĜE** | LERNEJO KIE ESPERANTO ESTOS INSTRUATA

# TAJ ŜI ŜUAN
## LUKTO-ARTO KAJ TERAPIO

Taj Ŝi Ŝuan estas lukto-arto devenanta el Ĉinio. Kreita inter la XII e XIII jarcentoj, ĝi ebligas al praktikantoj plibonigon de la sano, pligrandigon de la koncentriĝkapablo, ekzercante kaj fortigante la sangon, ostojn, muskolojn, tendenojn kaj organojn.

En Taj Ŝi la movoj estas farataj serene, celante imiti la movojn de la naturo (la bestoj, la plantoj, la vento, la ĉielo ktp.) kaj ankaŭ tiel ricevis siajn nomojn (preni nadlon el la marprofundo, unu pieda ora-koko, bufala korno-bato ktp), ĉar en praaj tempoj, la transsendo de la scio estis precipe voĉa, malmultaj sciis legi (ĉefe en Ĉinio, ĉar ekzistis kaj daŭre ekzistas miloj de ideografioj), do oni uzis kiel

**“ĜI ESTAS EĈ INDIKATA AL KIUJ SUFERAS PSIKOLOGIAJN PERTURBOJN”**

Referen con tion, kio disponeblis: la ĉielo, la luno, fiŝoj, la ĉevalo, la serpento, inter aliaj elementoj, inkluzive de kelkaj mitologaj, kiel unukorna besto kaj drako. En Ĉinio, ĝis nun, eblas vidi ĉiuaĝajn homojn trejnantaj sin en parkoj, kaj eĉ dum la UK-2004, en Beijing (Ĉinio), oni gvidis rapidan kurson pri Taj Ŝi.

Malgraŭ la verŝajna mildeco, Taj Ŝi povas esti bonega metodo por persona protekto, ĉar ĝi baziĝas sur la interna energio "chi" (ci) anstataŭ sur la fizika forto. Tiel eblas, ke bone trejnita praktikanto venku pli grandan kaj pli fortan malamikon. Taj Ŝi povas esti praktikata kun aŭ sen armiloj kiel la spado kaj lanco.
Tre rekomendata kiel terapio, ĝia praktikado povas esti komplemento por kuracaj traktadoj en hospitaloj, klinikoj kaj eĉ indikita por kiuj suferas psikologiajn perturbojn.
Ekzistas pluraj tipoj de Taj Ŝi Ŝuan, sed la plej konataj estas:

Stilo de la familio Chen: rekonata kiel la plej malnova stilo de Taj Ŝi Ŝuan. Ĉi tiu stilo estas praktikata pere de movoj mildaj kaj viglaj, kun saltoj kaj fortecaj eksplodoj, ĝia praktikanto laŭiras rondoforme. Ĝi estas tre milita stilo de Taj Ŝi kaj gi multe postulas de la praktikanto pro ĝiaj kompleksaj movoj. La dua plej praktikata stilo en la mondo kaj la tria en Brazilo, ĝi allogas multajn junulojn.

Stilo de familo Yang: La la dua plej malnova stilo. Kre ita de Yang Lu Chan, kiu estis dungito de la familio Chen. Li komencis lerni kaŝe la stilon Chen kaj, kiam malkovrita, luktis kun kelkaj familianoj de la familio Chen. Sukcesinte bonan rezulton, li estis akceptita daŭri lerni, nun malkaŝe. Post kelka tempo li translokiĝis el la kastelo de la familio Chen, kaj faris kelkajn modifojn en ilia Taj Ŝi, tiel ke ĝi fariĝis pli facile praktikebla kaj populara, kio igis ĝin la plej praktikata stilo de Taj Ŝi en la mondo. Iom post iom, la stilo Yang suferis modifojn faritanj de la posteuloj de Yang Lu Chan, ĝis ĝi fariĝis tio, kio ĝi estas hodiaŭ, stilo pli malrapida ol Chen, kun movoj pli larĝaj kaj grandaj, sen multaj eksplodoj, kun trajtoj malpli militaj ol stilo Chen.






Stilo de la familio Wu: Kreita de Wu Jianquan, la stilo estas konata pro ĝiaj movoj malfermaj, sekvante sintenon pli moderan, kies movoj iras laŭ rondoforma vojo.

Ĉi tiuj movoj, en kiuj la trunko kliniĝas pli antaŭen ol la skolo Yang, estas la detalo de la stilo Wu. Kvankam ankaŭ ĝi estas unu el la plej praktikataj stiloj en la tuta mondo, malmultaj estas ĝiaj adeptoj en Brazilo.

Stilo de la familio Sun: La skolo de Taj Ŝi Sun estis disvolvita de Sun Lu Tang. Ĝi estas la rezulto de mikso inter tri lukto-artoj, ĉar Sun Lu Tang estis fakulo pri Pa Kua Chang kaj Xing Yi Chuan, kunigante ilin kun Taj Si, stilo Yang. Ĝi instruis teknikon, kiuj estis al li tre karakteriza: pli malmolaj movoj kaj pli rapidaj ol tiuj de la stilo Yang, proksimiĝante al la stilo Chen. Ĝi ne estas tre konata kaj tre praktikata en Brazilo.

Stilo Pai Lin: Ĝi estas la plej nova stilo, kreita en Brazilo de la ĉino loĝanta en Brazilo - Liu Pai Lin. Li praktikis la stilon Yang en Ĉinio kaj kiam venis al Brazilo provis ĝin instrui.
Pro la lingvaj baroj kaj pro la malfacileco, kiujn trovis brazilanoj por lerni Taj Ŝi Ŝuan, li kreis alian stilon, kiu estas nomata kiel "Pai Lin'. La stilo havas ankoraŭ malpli da milita emfazo ol ĝia 'patro' Yang, tiel ke ĝi estas preskaŭ ekskluzive destinata al plibonigo de la sano. Estis forigitaj pluraj pli malfacalaj movoj de la Yang-stilo kaj la movoj sinsekvaj de la stilo fariĝis pli ripetataj, ebligante al pliaj homoj praktiki Taj Ŝi Ŝuan-n.
En Brazilo, la stilo Pai Lin plej popularigis la praktikadon de Taj Ŝi inter la maljunuloj. Kune kun la stilo Yang, Taj Ŝi "Pai Lin" estas la plej konata kaj praktikata en Brazilo.

Grave esta,s ke ĉiu stilo enhavas komunan esencon: mildeco, malpezeco, ekvilibro kaj koncentriĝo.

RAPORTIS | FELIPE QUEIROZ
TRADUKIS | ROGENER PAVINSKI



# LA MAJSTRO DE LA SIMPATIO

***Majstro Lee Wai Yin naskiĝis en 1938 en la urbo Tai Sam, provinco de Kuang Tong, Ĉinio. 18-jaraĝa translokiĝis al Hong-Kongo (kiam ĝin regis Anglio) kaj tiam li komencis praktiki Taj Ŝi kun sia kuzo.***
***Kun 24 li jaroj venis al Brazilo. Poste li revenas al Ĉinio dum unu jaro por perfektiĝo laŭ Taj Ŝi kaj Akupunturo en Pekina Universitato.***
***En la urbo Santos-SP, nun troviĝas lia akademio pri Taj Ŝi Ŝuan kaj Kung Fu.***

**Ĉu vi komencis instrui Taj Ŝi Suan tuj post via alveno al Brazilo?**

R: Ne... (ridoj). Mia kuzo Chiu Ping Lok jes, alvenis Brazilon kaj ĉiam instruis Kung-Fu, Taj Ŝi Ŝuan kaj jogon. Mi ekinstruis iom poste. Mi nur malfermis akademion en 1992, sed mi jam havis aliajn laborojn. Ankoraŭ nuntempe mi estas terapiisto, mi faras akupunturon kaj masaĝojn, sed mi jam laboris en pasteĉejo, posedis restoracion, jam estis pentristo...Ĉiujn ĉi bildojn de la akademio, estis mi kiu pentris.

**Kial vi decidis translokiĝi al Brazilo?**

R: Tie en Ĉinio la situacio malfacilis, ni ege laboris, ricevis malmulton, estis diktaturo kaj la lando estas homplena. La manĝaĵo ne estis abunda, en kelkaj tagoj mi manĝis nur rizon, nenion plu, tio aĉas! (ridoj). En Hong-Kong ne estis sufiĉa spaco kaj la loĝado multkostis. La plejmulto de la ĉinoj, kiuj decidis migri, iris al Usono, kelkaj por pli facile ekhavi vizon, migris al Brazilo unue. Ĉar mi ekŝatis Brazilon, mi decidis resti... Mia plej aĝa fratino loĝas en Usono, sed mi ne komprenas kiel ŝi povas vivi tie, mi plej ŝatas Brazilon, la homoj ĉi tie estas pli afablaj. Kaj cetere la kafo estas pli bongusta, la tiea kafo estas tre maldensa.(ridoj)



***"Grave estas, ke ĉiu stilo enhavas komunan esencon: mildecon, malpezecon, ekvilibron kaj koncentriĝon."***



**Ĉu estis malfacile por vi lerni la portugalan?**

R.: Jes, mi nenion komprenis! Mi ne sciis legi. Nuntempe fariĝis ordinare tiuj okcidentaj karaktroj en Ĉinio, sed antaŭe oni ne trovis, mi ĉion devis lerni denove! (ridoj)

Sed ĝis hodiaŭ mi ne tute regas la portugalan, mi kapablas kompreni kaj esti komprenata en iu kunveno, sed paroli publike hontigas min. Mi nur ne komprenas tiujn malfacilajn vortojn, kiujn la politikuloj ĉi tie diras...Pa! kio do? Mi ĉiukaze ne rajtas voĉdoni...(ridoj).

**Kiuj estas la diferencoj inter la brazilaj kaj ĉinaj praktikatoj de Taj Ŝi Ŝuan?**

R.: Mi kredas ke preskaŭ nenio, krom tio, ke Taj Ŝi estas parto de la Ĉina kulturo kaj en la brazila ne. En Ĉinio estas pliaj kaj pli bonaj instruistoj. Sed pri la lernantoj, ĉiuj estas homoj, kaj kiam ja decidas klopodi, ili sukcesas, ne gravas la naskiĝloko. La avantaĝo ĉi tie estas ke, la lernantoj estas ja miaj amikoj kaj ne nur lernantoj. Iun tagon mi lasis mian dokumenton sur la tablo, ili rigardis, parkeris mian naskiĝdaton kaj kiam alvenis la tago, ili faris festeton por mi. Tio neniam okazos se mi estos instruisto en Ĉinio.

**Kiun konsilon vi donos por tiuj, kiuj pri Taj Ŝi ekinteresiĝis?**

R.: Ekpraktiku! Ĝi bonas por la sano, plibonigas la menson de la homoj, mi eĉ kredas ke ĝi pli inteligentigas la homojn...
Mi rekomendas, mi nur havas la tutan forton, kiun mi hodiaŭ havas pro Taj Ŝi Ŝuan. En la komenco ne estas facile, viaj movoj malbelas, vi malekvilibriĝas, sed poste oni pliboniĝas, kaj la penado valoros! Vi konstatos la diferencon kiam maljuniĝos. Taj Ŝi estas ankoraŭ pli pova por tiuj, kiuj ne fumas, ne drinkas kaj ne manĝas multajn fuŝaĵojn. Mi estas fripono kaj ne vivas sen dolĉaĵo kaj refreŝigaĵo.

INTERVJUIS | FELIPE QUEIROZ
TRADUKIS | ROGENER PAVINSKI

# Futbala Mondpokalo

***La 9an de junio komenciĝos la 19a futbala Mondpokalo, en Germanio. La turniro daŭros 1 monaton kaj ĝin partoprenos 32 landoj, inter ili ĉiuj landoj kiuj jam skribis sian nomon ĉe la piedo de la pokalo de FIFA, escepte de Urugvajo. La plejvetinda estas Brazilo, kiu partoprenos por defendi la ĉampiontitolon per la plej brila selektitaro ekde 1982, tiam sub la komando de la karmemora trejnisto Telê Santana, forpasinta la 21an de aprilo, al kiu ni registras nian koran dankon kaj sinceran admiron.***

***Aliaj landoj, tradiciaj ĉe futbalo, aperos kun bonegaj teamoj, kiel Anglio, Argentino, Francio kaj Italio, krom Germanio, kiu ludos je la instigo de la loka apogantaro.***
***Sed vi scias kiel Brazilo fariĝis kvinobla ĉampiono? Kiaj estis ĝiaj rezultoj en la aliaj Mondturniroj? Kiuj ties plejgolintoj? Kiuj la la aliaj ĉampionoj? Ĉion ĉi vi ekscios per etaj resumoj pri ĉiu Mondpokalo. En ĉi tiu eldono de Momenton, vi ekkonos la historion de la Mondpokaloj ekde la unua turniro ĝis la gapiga kaj laŭrornamita triobla ĉampioniĝo de Brazilo en Meksiko!***

**URUGVAJO 1930**

**Finalo:** Urugvajo 4 x 2 Argentino

**Partoprenintaj landoj:** Argentino, Belgio, Bolivio, Brazilo, Ĉilio, Francio, Jugoslavio, Meksiko, Paragvajo, Rumanio, Urugvajo kaj Usono.

La unua futbala mondturniro okazis en Urugvajo. La finalon matĉis Argentino kaj Urugvajo. La urugvajanoj havigis al si la titolon venkante en la finalo per 3 kontraŭ 2. *Stabile*, de Argentino, estis la plejgolinto.
Brazilo, ĉe politika krizo, ne prezentis sin kun siaj plej bonaj futbalistoj kaj ne transpasis la unuan fazon. Urugvajo estis la ĉampiono, sed Argentino havis pli bonan teamon...
Surprizo estis la usona teamo, kiu restis en la tria loko, multe pli bone, ol Brazilo, eliminita en la unua fazo, kaj partoprenintа per teamo, kiu ne reprezentis la veran forton de la brazila futbalo.

**ITALIO 1934**

**Finalo:** Italio 2 x 1 Ĉeĥoslovakio

**Partoprenintaj landoj:** Argentino, Aŭstrio, Belgio, Brazilo, Ĉeĥoslovakio, Egiptio, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Italio, Nederlando, Rumanio, Svedio, Svisio kaj Usono.

La mondturniro estis en Italio. *Mussolini* volis la titolon kaj la selektitaro priatentis lian deziron, sub la komando de *Vitório Pozzo*, elvenkante Ĉeĥoslovakion en la finalo per 2 kontraŭ 1. Brazilo denove aperis sen sia maksimuma forto kaj malvenkis en la unua matĉotago antaŭ Hispanio.
La dua mondturniro de la historio suferis grandan mankon. Ne estis TV kaj Urugvajo, ĉampiono en 1930, por reprezalii la foreston de la eŭropanoj en la turniro, kiun ĝi okazigis, ne ĉeestis la mondturniron de Italio.



**FRANCIO 1938**

**Finalo:** Italio 4 x 2 Hungario

**Partoprenintaj landoj:** Belgio, Brazilo, Ĉeĥoslovakio, Francio, Germanio, Hungario, Nederlanda-Indonezio, Italio, Kubo, Nederlando, Norvegio, Pollando, Rumanio, Svedio kaj Svisio.

Rim.: Ĉar Germanio aneksis Aŭstrion, tiu ĉi, kiu havis lokon en la mondturniro, ne partoprenis ĝin.

En Francio, Brazilo sin prezentis sen la internaj kvereloj inter san-paŭlanoj kaj rio-de-ĵanejranoj kaj ne matĉis la finalon, ĉar malvenkis antaŭ Italio, havigante la trian lokon. Italio, ankoraŭ kun *Vitório Pozzo*, en la finalo, venkis super Hungario per 4 kontraŭ 2 kaj iĝis duobla ĉampiono. *Leônidas*, per siaj 8 goloj, estis la plejgolinto de la turniro. La Milito komenciĝis kaj oni restis 12 jarojn sen Mondturniro.
La ora trofeo restis kaŝita en la domokorto de la itala sportisto *Otorino Bassi* dum la tempo, kiom daŭris la konflikto. Ekreginte la paco, la trofeo estis portita al Brazilo, por esti denove prikonkurata. La propra *Jules Rimet* prenis sur si tian respondecon.

**BRAZILO 1950**

**Finalo:** Brazilo 1 x 2 Urugvajo

**Landoj:** Anglio, Bolivio, Brazilo, Ĉilio, Hispanio, Italio, Jugoslavio, Meksiko, Paragvajo, Svislando, Svedio, Urugvajo kaj Usono.

Finita la 2a Mondmilito, restis al Brazilo la devo okazigi la Mondturniron en 1950. Brazilo konstruis la plej grandan stadionon de la mondo, *Maracanã*. Kvankam Brazilo estis la plejvetinda, ĝi perdis la ĉampiontitolon por Urugvajo en la 16a de julio 1950, dato, kiun neniu brazilano forgesas. Estis 2 kontraŭ 1 kaj la urugvajanoj denove fariĝis ĉampionoj. La lastan fojon Brazilo uzis sian tute blankan uniformon, kiu, de post tiu tago, estis por ĉiam forlasita.
*Ademir Menezes*, de Brazilo, estis la plejgolinto de la Mondturniro. Alia surprizrezulto estis la venko de Usono, en Bela Horizonto, super Anglio, per 1 kontraŭ 0.
Sur la gazono, la turniro estis golhajlego. Brazilo entuziasmigis la apogantaron per kelkaj el la plej grandaj golar-venkoj jam registritaj en Mondpokaloj ĝis tiam, kiel 7 kontraŭ 1 super Svedio kaj 6 kontraŭ 1 super Hispanio.

**SVISLANDO 1954**

**Finalo:** Germanio 3 x 2 Hungario

**Partoprenintaj landoj:** Anglio, Aŭstrio, Belgio, Brazilo, Ĉeĥoslovakio, Francio, Hungario, Italio, Jugoslavio, Meksiko, Okcidenta Germanio, Skotlando, Sud-Koreio, Svedio, Turkio kaj Urugvajo.

La Mondturniro revenis al Eŭropo en 1954. La neŭtrala Svislando, kiu ne partoprenis en la Mondmilito, estis la ĝusta lando por gastigi la turniron, kiu prezentis, ĝis hodiaŭ, la plej grandan golaveraĝon.
Hungario estis la altiraĵo. Ĉe la fino, tamen, surprizis Germanio, per venko super Hungario per 3 kontraŭ 2.
La hungara selektitaro, de *Puskas*, *Czibor*, *Koksis* kaj aliaj, eliminis Brazilon kaj Urugvajon.
Post la Mondpokalo, multaj suspektoj ĉirkaŭvolvis la germanan selektitaron. Multaj el la ludistoj, kiuj matĉis la finalon, malsaniĝis post la konkurso. En tiu epoko, ne estis kontraŭstimulaj ekzamenoj.

**SVEDIO 1958**

**Finalo:** Brazilo 5 x 2 Svedio

**Partoprenintaj landoj:** Anglio, Argentino, Aŭstrio, Brazilo, Ĉeĥoslovakio, Francio, Germanio, Hungario, Jugoslavio, Meksiko, Nord-Irlando, Kimrio, Paragvajo, Skotlando, Svedio kaj USSR.

La venkoplena irado de Brazilo komenciĝis en 1958, en Svedio, kiam ĝi ekhavis la titolon, venkinte la svedojn per 5 kontraŭ 2, kaj prezentis al la mondo *Pelé, Garrincha, Didi, Nilton Santos, Djama Santos, Zito* kaj aliajn stelulojn. Brazilo tre bone ludis en tiu sia unua titolkonkero. Brazilo organizis sin kiel neniam antaŭe, kaj kunvokis eĉ psikologon por forviŝi la efikojn de la malvenko de 1950 kaj aliaj misfortunoj.
Francio havis la plejgolinton de la konkurso: *Just Fontaine*, kiu golis 13 fojojn kaj estas ĝis hodiaŭ la plej granda plejgolinto de Mondpokaloj de ĉiuj tempoj en unu sama turniro. *Pelé* kaj *Mané Garrincha*, krom *Zito* kaj *Vavá*, nur ekludis en la tria matĉo de la ĉampionumo, kontraŭ Sovet-Unio (venko per 2 kontraŭ 0), danke al petoj de la teamestroj kaj ne plu eliris el la ĉefteamo. En la kvaronfinaloj, la antologia golo de *Pelé*, kontraŭ Kimrio, donis al la brazila selektitaro la venkon per 1 kontraŭ 0. En la finalo, kontraŭ la turnirorganizantoj, fariĝis nekontestebla venko per 5 kontraŭ 2, kun du de la Reĝo, du de *Vavá* kaj unu de *Zagallo*.

ĈILIO 1962

Finalo: Brazilo 3 x 1 Ĉeĥoslovakio

Partoprenintaj landoj:

Anglio, Argentino, Brazilo, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Ĉilio, Hispanio, Hungario, Italio, Jugoslavio, Kolombio, Meksiko, Okcidenta Germanio, Svisio, Urugvajo kaj USSR.

Post kvar jaroj, en Ĉilio, por la sepa futbala Mondturniro, Brazilo havis preskaŭ la saman teamon de 1958 kaj malgraŭ la kontuzo de *Pelé* dum la dua matĉo, alvenis al la finalo, venkinte super Anglio kaj Ĉilio, por alfronti la duan fojon Ĉeĥoslovakion, kun kiu ĝi antaŭe egalpoentis en la unua fazo. Oni rimarkigu la malfacilan venkon super Hispanio (2 kontraŭ 1) kaj la facilan super Meksiko (2 kontraŭ 0). La stelulo de la Mondturniro estis *Garrincha* kaj Brazilo elvenkis en la finalo per 3 kontraŭ 1 kaj fariĝis duafoje mondĉampiono.



Ja el Brazilo estis la plej bonaj futbalistoj kaj la konkero estis justa. La trejnkomisiono daŭris la sama de 1958, escepte de la trejnisto *Vicente Feola*, malsaniĝinta. Lian postenon okupis *Aimoré Moreira*.

ANGLIO 1966

Finalo: Anglio 4 x 2 Germanio

Partoprenintaj landoj:

Anglio, Argentino, Brazilo, Bulgario, Ĉilio, Francio, Hispanio, Hungario, Italio, Meksiko, Nord-Koreio, Okcidenta Germanio, Portugalio, Svisio, Urugvajo kaj USSR.

Malgraŭ la steluloj, kiujn ĝi havis, Brazilo malbone ludis kaj ne transpasis la unuan fazon. Anglio gajnis la titolon, venkinte Germanion, dum la pludaŭrigo, per 4 kontraŭ 2. Rava estis Portugalio, kies elstara *Eusébio* estis la turnirgolisto.
En la malferma matĉo alfrontis unu la alian Urugvajo kaj Anglio. Ĝi estis malbela spektaklo, kiu finiĝis je 0 kontraŭ 0. La angloj estis fifajfitaj kaj duono de la teamo iris en la vestejon ne salutinte la reĝinon, ĉeestanta en Wembley.

MEKSIKO 1970

Finalo: Brazilo 4 x 1 Italio


Partoprenintaj landoj:

Anglio, Belgio, Brazilo, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Italio, Israelo, Maroko, Meksiko, Okcidenta Germanio, Peruo, Rumanio, Salvadoro, Svedio, Urugvajo kaj USSR.

Kvar jarojn poste, Brazilo denove brilis kaj golarvenkis Italion en la finalo per 4 kontraŭ 1. Refoje *Pelé* estis la plejkapabla de la turniro. La elvenko asignis al Brazilo definitive kaj por ĉiam posedi la pokalon *Jules Rimet*. La meksikanoj entute apogis la brazilan selektitaron. Multaj diras, ke tiu nia selektitaro estas la plej bonaj en ĉiuj tempoj.
La Mondpokalo havis aliajn memorindajn matĉojn. En la kvaronfinaloj, la revenĝo inter Germanio kaj Anglio, kiu matĉis la finalon de 1966, garantiis al la germanoj lokon en la venonta fazo, post vekon per 3 kontraŭ 2. En la duonfinalo inter Italio kaj Germanio, la venkon, per 4 kontraŭ 3, de la italoj markis la bildo de germana kapitano, Franz Beckenbauer, ludanta kun la ŝultro delokita kaj fiksbendita. La unuan fojon la ludo estis elsendita per televido al la tuta mondo kaj... kolore.

KONTRIBUIS | ROGER GOTARDI





**Integraciones**

*Después de todo te amaré*
*Como si fuera siempre antes*
*Como si de tanto esperar*
*Sin que te viera ni llegaras*
*Estuvieras eternamente*
*Respirando cerca de mí.*

*Cerca de mí con tus costumbres*
*Con tu color y tu guitarra*
*Como están juntos los países*
*En las lecciones escolares*
*Y dos comarcas se confunden*
*Y hay un río cerca de un río*
*Y dos volcanes crecen juntos.*

*Cerca de ti es cerca de mí*
*Y lejos de todo es tu ausencia*
*Y es color de arcilla la luna*
*En la noche del terremoto*
*Cuando en el terror de la tierra*
*Se juntan las raíces*
*Y se oye sonar el silencio*
*Con la música del espanto.*
*El miedo es también un camino.*
*Y entre sus piedras pavorosas*
*Puede marchar con cuatro pies*
*Y cuatro labios, la ternura.*

*Porque sin salir del presente*
*Que es un anillo delicado*
*Tocamos la arena de ayer*
*Y en el mar enseña el amor*
*Un arrebato repetido.*

***Pablo Neruda*** *(en “El Corazón Amarillo”)*

**Integriĝoj**

*Post ĉio mi amos vin*
*Kvazaŭ ĉiam antaŭe*
*Kiel post tiom da atend'*
*Sen ke vi venu, sen vin vidi*
*Vi estus deĉiame*
*Spiranta apud mi.*

*Apud mi kun viaj kutimoj*
*Kun via kolor' kaj via gitaro*
*Kiel estas kunaj la landoj*
*En la lernejaj lecionoj*
*Kaj du regionoj konfuziĝas*
*Kaj ekzistas rivero apud rivero*
*Kaj du vulkanoj kreskas kunaj.*

*Apud vi estas apud mi*
*Kaj disde ĉio estas via foresto*
*Kaj koloras argile la luno*
*En la nokto de l' tertremo*
*Kiam en la teror' de la tero*
*Kuniĝas la radikoj*
*Kaj aŭdeblas sonori la silento*
*Kun la muziko de l' ekmiro.*
*La timo estas ankaŭ vojo.*
*Kaj inter ĝiaj rokoj timigegaj*
*Vi povas marŝi per kvar piedoj*
*Kaj kvar lipoj, la tenero.*

*Ĉar sen eliri la pasantan tempon*
*Kiu estas ringo delikata*
*Ni tuŝas la sablon de hieraŭ*
*Kaj en la maro instruas pri am'*
*Ekkolero ripetada.*

***Pablo Neruda*** *(el 'La Flava Koro')*


*Anonima tradukanto*

*Pablo NERUDA, origine: Neftalí Ricardo REYES Basoalto, (naskiĝis la 12-an de julio, 1904 en Parral, mortis la 23-an de septembro, 1973 en Santiago de Chile) estis ĉilia poeto kaj komunisto. Sian pseŭdonimon NERUDA li elektis honore al la ĉeĥa verkisto Jan NERUDA.*

# Kutime ni plene fidas niajn okulojn

Ni eĉ povus diri, ke ni blinde fidas la okulojn… Kia paradokso! … sed… ĉu tio vere estas paradokso?! Do, mi proponas al vi, ke vi eltrovu mem. Antaŭ vi, vi vidas la unuan parton de nia ekskurso al la mondo de la Vido-iluzioj. Ni komencas per la plej famaj, sur kiuj baziĝas ofte la komplikaj iluziaj pentraĵoj de altnivelaj verkistoj. Pro tio estas bone unue koni la simplajn 'skeletajn tipojn'. Multan ĝojon al vi!

*(Kontribuo de Aneta Ubick el Germanio)*



**I. La neebla triangulo**
Ĝi estas eble la plej konata iluzia fenomeno. Kvankam la neebla triangulo vere ŝajnas 'ebla', vi devas konstati, ke en ĉiu angulo troviĝas paradokso. Provu rigardi la triangulon kiel unu tuto. Tiel ĉiu trabo ŝajnas 'normale' renkontiĝi unu kun la alia, sed fine ili kuniĝas en nerealeco.

**II. La spirala iluzio**
Oni metis la spiralon sur desegnon kun nigraj radioj… Momenton! Ĉu tio vere estas spiralo ?!

*Klarigo*:
Sekvu la 'kvazaŭ-spiralon' kaj vi rimarkos, ke temas pri multaj koncentraj cirkloj. La spirala efekto ekestas pro aldonaj kontrastigaj linioj kiuj ŝajnigas la cirklojn unu spiralo.






**III. La senfina ŝtuparo**
Sekvu la ŝtupojn en unu direkto. Baldaŭ vi rimarkos, ke vi aŭ senfine descendas, aŭ senfine grimpas… sen vere alveni al iu celo.


*Klarigo:*
Ĉi tie la iluzio ekestas pro la speciala perspektivo, kiu igas, ke la surfaco ŝajnas paralela. Tamen ne!
Kontrolu mem…



**IV. La krada reto**

La malhelaj punktoj en la kruciĝoj de la blankaj stratoj estas iluzia trompaĵo de via vida kapablo!






**V. La fulmo-krado**

Kiam vi dum mallonga tempo rigardas tiun kradan reton, vi baldaŭ vidos ĉarmajn fulmetojn en la kruciĝoj!!!

Jen, vi ekkonis diversajn specojn de vido-iluzioj.

Ĉu vi povas diri, al kiu speco apartenas tiu ĉi?



*Solvo: La bildo apartenas al la speco de "senfinaj ŝtuparoj".*